Informilo de Baltaj Esperanto-Tagoj , BET-52 en Birštonas, Litovio

# Balenido

Vendredo, la 8-a de julio 2016 **N-ro 7**

## Komuna kantado de la litova himno

La 6-an de julio je la 21-a horo en Birštonas, en la parko de Vytautas, estis organizita publika kantado de la himno de Litovio, okaze de la litova ŝtata festo – Tago de la ŝtato (kronigo de la Litovia reĝo Mindaugas). BET-anoj aliĝis al tiu kantado.



Fotoj: Gražvydas Jurgelevičius

**Komuna foto de esperantistoj kaj la urbestrino de Birštonas, dum kantado de la Litova Himno.**



## Pri urboj kaj fabeloj

Tagmeze la 6-an de julio Anna Striganova prelegis pri dronintaj urboj, realaj kaj fabelaj (legu pli en *Balenido* 4, paĝo 4).

## Programo

### La 9-a de julio (sabato)

| | |
|---|---|
| **08.00 – 09.00** | **Matenmanĝo** (Manĝejo) |
| **09.00 – 10.00** | **Somera Universitato.** Prof. Aloyzas Gudavičius: Prelegciklo pri la litovaj lingvo, kulturo, historio (Ĉefsalono) |
| **09.00 – 10.00** | **Somera Universitato.** Ed Robertson: Kabe: ĉu eterna mistero? (str. Birutės 21, la tria etaĝo) |
| **09.00 – 10.30** | **Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj** en klasoj de la urba gimnazio (Kęstučio str. 29). |
| **10.00 – 10.45** | **Somera Universitato.** Anna Striganova: Mi antaŭsentas Vin. Romantika historio por romantikaj knabinoj (Ĉefsalono) |
| **10.00 – 10.45** | **Somera universitato.** Wolfgang Loose: Mezurado de astronomiaj distancoj (str. Birutės 21, la tria etaĝo) |
| **10.45 – 12.15** | **Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj** en klasoj de la urba gimnazio (Kęstučio str. 29). |
| **11.00 – 10.45** | **Prelego.** Dima Ŝevĉenko: Esperanto en socireta epoko (Ĉefsalono) |
| **11.00 – 11.45** | **Prelego.** Mian Salam Shany: Pri kulturoj de Pakistano kaj Nepalo (la 1-a parto) (str. Birutės 21, sur la tria etaĝo) |
| **12.00 – 12.45** | **Prelego.** Mian Salam Shany: Pri kulturoj de Pakistano kaj Nepalo (la 1-a parto) (str. Birutės 21, sur la tria etaĝo) |
| **12.00 – 12.45** | **Prelego.** Ingrid Näsholm: Rilatoj inter homoj kaj bestoj (Ĉefsalono) |
| **13.00 – 14.00** | **Tagmanĝo** (Manĝejo) |
| **14.30 – 15.15** | **Somera Universitato.** Aleksander Korĵenkov: Bakerstrato 221b. La aventuroj de Ŝerloko Holmso en Esperanto (Ĉefsalono) |
| **14.30 – 15.30** | **Solena fermo de BET-52** (Ĉefsalono) |
| **16.00 – 18.00** | Libera tempo |
| **18.00 – 19.00** | **Vespermanĝo** (Manĝejo) |
| **19.30 – 22.00** | **Koncerto de kantensemblo de Vilna Instruista Domo “La Nigra Rozo”. Adiaŭa vespero kaj aliaj koncertoj** (Ĉefsalono) |

# El niaj kursejoj

**En BET-52 okazas 7 Esperanto-kursoj de 4 niveloj. Jen kvar ilustraj fotoj de Gražvydas Jurgelevičius.**



La komencantoj kun Stano Marček


La komencintoj kun Aida Čižikaitė


La progresantoj kun Nina Petuchowska


La komencantoj lernas ankaŭ dum paŭzoj. Fotoj: Gražvydas Jurgelevičius


# Robertson pri DUOLINGO

Marde la 5-an de julio okazis, kadre de Somera Universitato, prelego de Ed Robertson pri la senpaga lingvolernilo DUOLINGO. Foto: Gražvydas Jurgelevičius




# Bakerstrato 221b

**Antaŭ dudeko da jaroj la Ruslanda eldonejo Sezonoj lanĉis la libroserion *Mondliteraturo*, en kiu aperas verkoj, konataj en la mondo kiel "ŝatataj legaĵoj", kun kiuj oni intimiĝas junaĝe, kaj kiujn oni poste relegas, kiuj aperas en pluraj novaj kinaj versioj.**




En la listo de la aperintaj libroj enestas, interalie, *La Mastro de l' Ringoj* de Tolkien kaj ties *La hobito*, du noveloj de Lewis Carroll pri Alico, kvin volumoj de Georges Simenon pri komisaro Maigret, antologieto de Borges-aj verkoj prozaj kaj poeziaj, populara vojaĝromano de Jules Verne *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*, *La legisto* de Bernhard Schlink kaj aliaj, inter kiuj plej laste aperis *La aventuroj de Ŝerloko Holmso* de kavaliro Arthur Conan Doyle.

Pri ĉi tiu libro en BET-52 prelegos la Kaliningrada ĵurnalisto, redaktoro kaj tradukanto Aleksander Korĵenkov, kunordiganto de la projekto "Ŝerloko Holmso en Esperanto". La prelego okazos sabate la 9-an de julio 14.30-15.15 (Ĉefsalono).

La libro *La aventuroj de Ŝerloko Holmso* estas aĉetebla en BET-52 kontraŭ nur 6 eŭroj (18 eŭroj ĉe UEA), kaj oni povos aĉeti ĝin tuj post la fino de la prelego.

# Liepāja – urbo de BET-53

**La 53-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj okazos ekde la 1-a ĝis la 8-a de julio 2017 en Liepāja – la 3-a plej granda urbo de Latvio (~ 80 mil da loĝantoj). Liepāja situas en la sudokcidento de la lando ĉe Balta Maro, 220 km de Rigo.**




Ĝi havas riĉan historion – unue menciita en la jaro 1253, la urban rajton akiris en 1625. Siajn spurojn en Liepāja lasis kaj svedaj reĝoj, kaj germanaj baronoj, kaj rusaj caroj. En 1919 dum la Liberiga Milito Liepāja iun tempon estis ĉefurbo de Latvio, ĉar al ĝi translokiĝis la latvia registaro.

Unika arkitekturo de Liepāja per diverseco de stiloj kreas specifan atmosferon, karakterizan nur por tiu urbo – la plej grandaj kvanto da lignaj konstruaĵoj, multaj belegaj domoj de la germana arkitekto Paul Max Bertschy, stratetoj kovritaj per ŝtona pavimo. Tamen ne nur pri historiaj konstruaĵoj povas fieri liepajanoj – en 2015 ili akiris vastan kaj modernan koncerthalon „La granda sukceno“ (sube dekstre), ĉar ĝuste sukceno estas unu el la simboloj de la urbo.



Liepāja allogas per: la plej blanka kaj fajna sablo sur la strando; urboparto Karosta (Milita haveno) kaj ĝia historia armea malliberejo, proponanta specialan spektaklon kun partopreno de vizitantoj – „Malantaŭ krado“ (ne por homoj kun malfortaj nervoj); unu el la plej grandaj mekanikaj orgenoj en Eŭropo en luterana preĝejo de Sankta Triunuo (ĝis 1912 la plej granda en la mondo); katolika preĝejo de Sankta Meinardo – iama pavilono de Vatikano en la Internacia ekspozicio EXPO 2000 en Hanovro, Germanio; Aleo de la Famo de latvaj muzikistoj kaj multaj aliaj vidindaĵoj.

Oni nomas Liepāja la ĉefurbo de latvia muziko. Krom jam menciita Aleo de la Famo pri tio atestas multaj kun muziko ligitaj objektoj – la plej granda tamburo en Latvio, Arbo de Fantomoj, turisma itinero „Liepāja – kiel laŭ muziknotoj“ k.a. La urba himno „En urbo kie naskiĝas vent’“ – dank’ al populara Esperanto-kantistino liepajanino Austra Pumpure – estas bone konata al multaj esperantistoj. En Liepāja oni povas trovi grupon de skulptaĵoj, dediĉitan al ĉiu strofo de la fama kanto.

Liepāja havas ankaŭ riĉan Esperanto-historion: Esperanto-societo tie estis fondita en 1925. Nun ĝi estas la sola urbo en Latvio, kie oni povas trovi straton Esperanto.

BET-ejo de la 53-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj estos Mezlernejo No 6, situanta proksime de favorpreza hotelo kaj ne tro for de la studenta hotelo de Liepāja Universitato. Informilon No 1 vi povas trovi en hejmpaĝo de Latvia Esperanto-Asocio *http://www.esperanto.lv*, kie funkcias jam ankaŭ la reta aliĝilo.

Programo de BET-53 estos tradicia: diversnivelaj Esperanto-kursoj, enkonduka kurso en latvan lingvon, Somera Universitato, Sankta Meso en Esperanto, Interkona, Nacia kaj Internacia Vesperoj, duontagaj kaj tuttaga ekskursoj, kvizoj, filmoj, kantoj, dancoj k. a. aranĝoj. Bonvenon al Latvio! Bonvenon al BET-53 en Liepāja!

Margarita Želve
Prezidantino de Latvia Esperanto-Asocio
*margarita.zelve@gmail.com*







Prof. Georgio Silfer
Foto: Gražvydas Jurgelevičius

# Ĉiam ne tiu

Interesaj prelegoj ĉiam vekas kompletigajn pensojn. La prelego „Centralismo aŭ federalismo“ de prof. Georgio Silfer ne estis escepto. Li laŭiris la historie informan vojon de UEA al nuna organisma sistemo. Poste li traktis kiom reale funkcias la elektorajtoj en UEA, ankaŭ en Eŭropa Unio k.s. kaj konstatis, ke elektitaj gvidantoj ofte ne respondas interesojn de tiuj, kies interesojn tuŝas la akceptotaj decidoj. Mi iris plue kaj provis konjekti, kion la preleginto intencis diri, sed ne diris. Ankaŭ vi, certe, konsentos, ke la problemon faras tio, ke ni ĉiam elektas „ne tiujn“ personojn (ne „tiun“ deputiton, ne „tiun“ prezidanton ktp.).

Aŭskultinte la prelegintan profesoron, ni povis kompreni, ke la elektoproblemoj rilatas nur al UEA (kie regas centralismo), sed ne al Esperanta Civito (kiu elstaras pri federalismo). Tion la profesoro (konsulo de Civito) modeste prisilentis. Ne decas ja sin tro laŭdi. Ĉu la organiza sistemo (temas, kompreneble, nur pri UEA) povus pliboniĝi? Nu, estas malfacile ion ŝanĝi nenion ŝanĝinte. Mi ne scias pri kio pensas tiuj, kiuj pledas por ŝanĝoj. Temas, unue, pri elekto de taŭga UEA prezidanto, ĉu? Sed jen la problemo – kiel tion atingi, se sole taŭga „tia“ kandidato estas eĉ ne individua membro de UEA... Kion fari? Ĉu ni raŭmu en raŭma areo?

**Vytautas Šilas**



## Ĉu vi jam vizitis la libroservon?

**Ĝi troviĝas dekstre de la manĝejo, str. B. Sruogos 6, en Odontologia kliniko. Atendas vin multaj interesaj Esperantaj libroj, diskoj kaj aliaj esperantaĵoj!!!**

## La lasta ŝanco kontribui al *Balenido*

Morgaŭ aperos la lasta, 8-a numero de ***Balenido.*** Se vi havas ankoraŭ informojn, raportojn, anoncojn, eventualajn ŝanĝojn de la programo, precizigojn, fotojn k.s, jen la lasta ŝanco. Bonvolu meti ilin en tiucelan skatolon ĉe la akceptejo, aŭ sendu ilin rete al: *stano.marcek@gmail.com.* **Stano Marček, via redaktoro**




## Humuro



### Ĉionscia edzino

Furioza edzino enkuras kabinedon de sia edzo: – Mi jam ĉion scias! – La edzo ne konsterniĝas: – Ĉu !? Jam!? Diru do kiom da reguloj havas gramatiko de Esperanto.

### Kiuj UK-oj sen mi?

Ĉi-jare mi ne iros al Slovakio. Pasintjare mi ne iris al Francio. Antaŭpasintjare – al Argentino. Ankoraŭ pli frue – al Islando kaj Vjetnamio. Sekvajare mi ne iros al Koreo. Mi eĉ ne scias kien poste mi ne iros... (Vytautas Šilas)